

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1997:1

## SEF-KONGRESSEN LESJÖFORS 1997

Anmäl dig före den 25 april och spara 100 kronor!



MALAPERINTAJ  
BESTOJ  
P. 7

MALAPERANTAJ  
KULTUROJ  
P. 6

**Redaktion:**

Jan Setréus  
Mörtgatan 7 SV  
133 43 Saltsjöbaden  
tel. 08 - 717 75 67

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** Reklamtryck AB, Stockholm 1997

**Prenumeration 1997:** 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1997:**

Direktansluten medlem 170 kr.  
Famijmedlem (utan tidning) 75kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Fax:** 08 - 34 08 10

**Postgiro:** 578-5

**Telefontid:** Samma som EsperantoCentro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson,  
Seminariegratan 3 A, 752 28 Uppsala

**OBS! Manus till La Espero**  
sänds till Jan Setréus  
Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

*La Espero* estas presata  sur recikligita papero.

Karaj membroj

Bonvolu telefoni al mi – aliaj faras tion. Mi ricevis plurajn interesajn informojn dum la lastaj du monatoj. La plej multaj telefonvokoj venas de tute diversaj homoj, kiuj deziras informojn. Gimnazianoj kaj kursanoj de KomVux petas pri abundaj informoj, ĉar ili devas prezenti esplorrporton pri esperanto. La plej multaj demandoj (ĉ. 200) pro la UR-serio en radio, iris rekte al Lars Forsman en Karlskoga. Trideko venis al SEF.

**Universitato**

Iu instruisto invitis min por prelego antaŭ studentoj en la branĉo *kulturo* en la universitato de Uppsala. Dek ok studentoj aŭskultis mian duhoran prelegon la 11-an de februaro. La kaŭzo de la invito estis la libro de Umberto Eco – *La serĉado de la perfekta lingvo*. La instruisto ĵus estis leginta la libron, kaj li trovis ke Eco skribis interese pri esperanto. En mia prelego mi menciis je la fino, ke troviĝas bona informfonto ene de la universitato – profesoro Christer Kiselman. Post tio la instruisto diris al mi, ke li certe kontaktos kun Kiselman.

**Gimnazianoj en Helsingborg**

Nova aktiva membro en Helsingborg ne nur eklernis esperanton mem, sed ankaŭ interesis la filon por esperanto. La filo, Henrik Randehed, siavice faris reklamon por esperanto inter samklasanoj en la gimnazio.

Kiam la gimnazianoj devis elekti studobjekton por la venonta studjaro, montriĝis ke 17 el ili elektis esperanton! La rektoro ne estis preparita por tia intereso, kaj li provis trovi argumentojn kontraŭ la ideo. La demando pri esperanto kiel studobjekto ankoraŭ ne estas findiskutita. Vi ricevos informojn en la sekvonta *La Espero*. La patro Kjell Randehed informis min. KIU diris, ke gejunuloj ne interesiĝas pri esperanto?

Alia gimnazio ankaŭ diskutas pri esperantokurso. Estas gimnazio en Huskvarna, kie nia membro Rolf Nordström estas instruisto de lingvoj. Pasintaŭtune li ricevis monon por fari ekspozicion pri esperanto en la gimnazio. Tio kom-

preneble vekis intereson ĉe kelkaj. Rolf Nordström jam ekster la ordinara studprogramo instruis esperanton al kelkaj gimnazianoj.

**Lernolibro de latino**

Antaŭ unu semajno atingis min informo, ke iu persono prezentos novan lernolibron de latino ĉe ABF en Stokholmo. Sur la aŭŝeto pri la evento aperis la nomo Bengt Göransson, eksa ministro. Ĉu iu volas propagandi pri latino kaj ĝia rolo kiel neŭtrala solvo de la lingva problemo en EU?

Inter 40 aŭskultantoj sidis mi kaj tri aliaj esperantistoj. Bengt Göransson bonvensalutis la verkiston de la nova lernolibro, kaj petis lin prezenti ĝin. Post la prezento de la libro kaj de teksto, kiun li prenis el la finna televidprogramo, la verkisto Staffan Edmar respondis al diversaj demandoj. Unu demando temis ĝuste pri latino kaj EU. Staffan Edmar ne kredas ke latino iam estos uzota en EU, pro diversaj kaŭzoj. Unu el la argumentoj kontraŭ latino venis de konato lia, Ebbe Vilborg. Kio? Ĉu nia Ebbe Vilborg? Jes, fakte. Edmar havas kontakton kun Vilborg, kaj eĉ parolis kun li en tiu sama tago. La argumento citita, temis pri manko de multaj terminoj en latino por ke ĝi povu funkcii en ĉiuj fakoj.

Do – ni esperantistoj povis promeni hejmen kun trankvilo en la animo. Latino ne estas konkuranto. Ankaŭ Bengt Göransson montris klare, ke latino ne estos solvo por EU. Li ankaŭ substrekis ke EU devas trovi unusolan laborlingvon, alie la unio kolapsos. Li ne diris, kiun lingvon li ŝatus vidi kiel laborlingvon, sed mi rimarkis ke li diris "oni bezonas facilan alternativon"...

Roland Lindblom



*Manusstopp den 27/4  
för nästa nummer av  
La Espero*

# Årskongress i Lesjöfors

**Svenska Esperanto-Förbundet kommer att genomföra sin årskongress i Lesjöfors den 17/5 – 19/5.**

Esperantogården är säkert värd ett besök, men den klarar inte en kongress med så många deltagare som vi brukar vara, d.v.s. cirka 100. Det närbelägna Folkets Hus klarar invigningen, årsmötet och övriga program utan problem. Här klarar vi bortåt 200 personer, så tveka inte.

Esperantogårdens vandrarhem har en ganska stor matsal – men blir vi över 100 deltagare till luncher och middagar får en del äta lite fortare för att lämna plats för väntande. För dem som ska bo på vandrarhemmet blir det inte trångt vid frukostborden, eftersom det bara finns sängplatser för ca 50 av deltagarna.

Esperantogården erbjuder inte enkelrum. Du som absolut vill ha enkelrum får boka in dig på hotell i Filipstad. Avståndet är 32 km. Har du bil är det inget problem. Vi kommer dessutom att ordna egna busstransporter mellan Filipstad och kongressen. Möjligheterna att få hyra in sig i privatrum i Lesjöfors undersöks vid tiden för denna tidnings pressläggning.

Du får beställa övernattning efter de alternativ som finns, men chansen att få det du helst vill ha minskar med tiden, dag för dag. "Först till kvarn..."

I anslutning till SEF:s kongress kommer även KELI att hålla sitt årsmöte. Man tar upp frågan om minskande antal medlemmar.

Även svenska sektionen av ILEI kommer att ha sitt årsmöte i samband med SEF-kongressen, trol. vid 9-tiden den 18 maj.

Likaså arrangeras SEJU:s årsmöte vid samma plats och tid, ev. på lördag e.m.

## Hur anmäler man sig?

Du anmäler dig per postgiro genom att ange vad du betalar för. Titta närmare på exemplet till höger.

Tre uppgifter behöver finnas med: deltagaravgift, mat, logi.

Deltagaravgiften är 250 kr vid inbetalning före den 25 april och 350 kr vid inbetalning efter den 25 april. SEJU-medlemmar betalar bara 100 kr.

På Esperantogården gäller följande priser för maten under kongressen:

|                  |        |
|------------------|--------|
| Frukost          | 40 kr  |
| Lunch            | 50 kr  |
| Middag på lördag | 100 kr |
| Middag på söndag | 85 kr  |

## Logi

Esperantogården har inte rum och sängar för alla deltagare. Det finns 2-bäddsrum med extrasäng och det finns 4-bäddsrum.

En sängplats kostar 115 kr per natt. Ta med lakan annars kostar det 60 kr extra.

**OBS! Du måste ta med egen handduk!** Priset inkluderar att rummet blir städad, så du slipper den detaljen under kongressen.

Hotell John i Lesjöfors har 3 rum för oss.

- 2 personer. Dubbelsäng. Med WC.
- 2 personer. Separata sängar. Med WC.
- 3-bäddsrum. WC i korridor.

Kostar 290 kr per natt och person, inkl. frukost.

På campingplatsen, 4 km från Esperantogården, finns:

*Fyra campingstugor* med plats för 4 personer i varje. Kök i servicebyggnad. Våningssängar. En stuga kostar 250 kr per natt.

*Två lägenheter.* Vardera har 4 bäddar i våningssängar. Kök för egen mathållning. En lägenhet kostar 325 kr per natt.

*Husvagnsplatser.* WC och dusch i separat servicebyggnad. En husvagnsplats kostar 90 kr per dygn. Några har eluttag (tilläggsavgift 30 kr).

Vanligt hotell är förhandsbokat i Filipstad (enkelrum: 460/natt; dubbelrum: 580/natt inkl. frukost), lämpligt för deltagare med bil. Busstransport mellan Filipstad och Esperantogården ordnas av kongressen.

Ange dina önskemål på postgirotalongen.

Ange först vilket slags mål eller logi det gäller och för vilka personer, sedan vilka dagar du vill ha detta.

## Exempel för två personer

|                |   |           |
|----------------|---|-----------|
| <b>Avgift</b>  | betalt före 25/4                              | (250)     |
| <b>Frukost</b> | –   |           |
| <b>Lunch</b>   | 18/5  | (50)      |
| <b>Middag</b>  | 17/5 och 18/5                                 | (100+85)  |
| <b>Kaffe</b>   | 17/5 (e.m.) och 18/5 (e.m.)*                  | (25) (25) |
| <b>Logi</b>    | 17–18/5 och 18–19/5: Hotell John dubbel-säng. | (2x290)   |

Det här exemplet skulle kosta  
2x(250 + 50 + 100 + 85 + 25 + 25 + 290 + 290) kr = 2.230 kr

**Postgiro 481 43 95 – 2 Esperantokongressen**

\* På Folkets Hus kommer kaffe med tilltugg att serveras för 25 kr.

## PRELIMINÄRT PROGRAM

### Lördag 17 maj

|       |                                   |
|-------|-----------------------------------|
| 12.00 | Lunch                             |
| 14.00 | Invigning (Folkets Hus)           |
| 15.00 | Kaffepaus                         |
| 15.30 | Föreläsning och annat             |
| 18.00 | Middag                            |
| 19.30 | Underhållning och Esperanto-disco |

### Söndag 18 maj

|             |   |
|-------------|---|
| 8.00-10.00  | Frukost   |
| 9.00        | KELI:s gudstjänst                                       |
| 10.00-11.30 | Årsmöte i Folkets Hus                                   |
| ca 13.00    | Lunch   |
| 14.00-17.00 | Diverse program<br>– diskussionsgrupper<br>– bokauktion |
| 18.00       | Middag  |
| 19.00       | Kvällsprogram   |

### Måndag 19 maj

|       |                        |
|-------|------------------------|
| f.m.  | Diverse programpunkter |
| 13.00 | Lunch                  |

## På schemat i Huskvarna

### KALLELSE

Andelsägare i Förlagsföreningen Esperanto kallas till årsmöte i Lesjöfors lördagen den 27 maj 1997 kl. 16.30.

Styrelsen

Esperanto som C-språk kommer att erbjudas i gymnasiet i Huskvarna till hösten. Minst 16 elever kommer att få läsa esperanto två timmar i veckan, sedan skolledningen i Jönköpings kommun accepterat Rolf Nordströms förslag att på prov under ett läsår få undervisa i esperanto.

Rolf är språklärare vid gymnasiet och sedan många år medlem i SEF. Han har under senare år beklagat sig över kollegors oförstående inställning till Rolfs esperantointresse. I februari 1996 kom det en stor artikel i Jönköpings-Posten, signerad Rolf Nordström. Detta blev grunden till det som nu beslutats.

Rolf fick pengar till en utställning på skolan i höstas, och SEF fick glädjen att leverera ett antal böcker, som nu finns tillgängliga för skolans elever. Det abonneras också på TEJO-tidningen *Kontakto*. Vi gläds med Rolf och gratulerar till framgången.

### Resumé på esperanto:

#### GIMNAZIO EN HUSKVARNA MALFERMIS POR ESPERANTO

Lingvoinstruisto Rolf Nordström finfine sukcesis persvadi la decidajn instancojn akcepti esperanton kiel ordinaran studobjekton. La kurso daŭros unu jaron kun 2 studhoroj ĉiusemajne. Dek ses gimnazianoj elektis la novan studobjekton. Ili jam scias iom pri esperanto, ĉar en la pasinta aŭtuno okazis ekspozicio dum kelkaj semajnoj en tiu gimnazio.

Roland Lindblom

## "Information om esperanto"

Som framgick av förra numret av *La Espero* kompletterades utbildningsradios programserie om esperanto med ett häfte med titeln *Information om esperanto – Komplement till UR:s programserie Esperanto – ett språk – en idé*. Författare är Lars Forsman vid Karlskoga Folkhögskola. Den som skickar ett frankerat kuvert med namn och adress samt ett frimärke för pappers- och tryckkostnader får häftet från

Esperantolinjen  
Karlskoga Folkhögskola  
691 24 Karlskoga

Häftet präglas av Lars Forsmans smittande entusiasm och ger en del fakta om esperantos historia och om dess ställning idag. Några sidor ägnas den grundläggande grammatiken. Vanföreställningar om språket får sitt genmäle. Allt beledsagas av "roliga gubbar". Häftet får ses som en fördjupad introduktion för den intresserade, men den redan kunnige esperantisten kan troligen finna något nytt argument till sin verbala arsenal.

Visste du t.ex. att Zamenhofs första språk Lingwe Uniwersala bokstavligen gick upp i rök, att nynorskan är ett planerat språk, att Karlskoga Folkhögskola sedan 1988 undervisar i esperanto, att en italiensk EU-kommissionär lovordar esperanto eller att ostasiatiska barns bättre matematikkunskaper bl.a. beror på ett talsystem som liknar esperantos?

## Esperantoexamen den 27 april

På vilken nivå ligger dina esperantokunskaper? Passa på att testa dig när det nu är dags att anmäla sig till lägre eller högre examen. Du som leder kurser – tala med dina kursdeltagare om Esperantoinstitutets årliga examensprov.

Anmälan och förfrågningar görs till Ebbe Vilborg. Ring eller skriv!

Telefon: 031 – 40 52 74.

Adress: Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.

## Testamentgåva

Bror Lindström var en "folkrörelseman" i Vattholma, norr om Uppsala, med kommunala förtroendeuppdrag. Han avled 1984 vid 77 års ålder, och då fanns redan ett testamente där Esperantoförbundet fanns med. Brors fru Kally Lindström avled i höstas, och den nyligen avslutade bouppteckningen visade att SEF får 32.700 kr.

Vid samtal med Karl Söderberg, Uppsala, fick vi veta att Bror varit medlem i Uppsala i yngre år. Senare hade han lett kurser i Vattholma. Söderberg kände Bror Lindström både genom esperanto och genom att båda varit kommunalt aktiva, och det var Söderberg som visste att Bror Lindström varit en folkrörelseman av gammal god sort.

SEF tackar och sänder en hälsning till efterlevande släktingar.

Red

Roland Lindblom

Ĉe la eniro de la Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors staras tia ĉi panelekspozicio informanta pri esperanto. Ĉin faris Kaisa Hansen kaj Anita Bergh, Esperanto en Väsby. Ĉu vi bezonas ion similan? Ili volonte helpas ankaŭ vin! Nur telefonu al Kaisa 08 – 590 882 10 aŭ Anita 08 – 590 858 72.



## TEVA-representanto en Svedio

Kadre de UEA troviĝas ĉirkaŭ 50 fakaj asocioj. TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) fondiĝis jam frue en la esperantomovado, 1908. Nun troviĝas nova reprezentanto de TEVA en Svedio – Arne Wingqvist. Arne estas vigla pensiulo, kiu eklernis esperanton meze de 1995. Li partoprenis en la Praga UEA-kongreso pasintjare, kaj vizitis la kunsidon de TEVA. Li akceptis reprezentanti la TEVA-organizon en Svedio.

Vi, kiu interesiĝas pri vegetaranismo, turnu vin al Arne kaj petu informojn. Telefono kaj adreso: 08 – 511 731 00. Centralvägen 8, 186 31 Vallentuna.

Roland Lindblom

**INTENSIVKURS  
I ESPERANTO**

Esperanto-Stockholm anordnar en intensivkurs i esperanto den 19 april och 20 april. Det blir tre nivåer; nybörjar-, fortsättnings- och konversationskurs. Kursen genomförs i Brygghuset. Anmälan görs till Roland Lindblom tel. 08 - 777 41 75, senast den 17 april.

**Kompakta disko  
de muziko  
en esperanto**

En la unua numero ĉijare de *Boletín*, la revuo de la Hispania Esperanto-Federacio, oni povas legi pri disko nomita Esperanto. La komponisto havas simpation por Esperanto sed ne mem parolas la lingvon. Pro tio la Hispania Esperanto-Federacio helpis lin, kaj ankaŭ peris kontaktojn al lokaj Esperantistoj en Moskvo kaj Sofio, kie la profesiaj korusoj kiuj kantis bezonis lingvan konsilon. La muziko estas nova registrado de klasikaj muzikaĵoj sed ne la plej famaj escepte de la Odo al Ĝojo de Beethoven. Kaj televide kaj radie oni multe aŭdigis la muzikon de la disko, kiu faris fortan reklamon en Hispanio por kaj la disko kaj Esperanto. Aldone la muzikaj radiostacioj informis pri Esperanto al sia celgrupo, la gejunuloj.

La hispana Esperantomovado tre serioze traktis la aferon, ne nur dum la produktado, sed ankaŭ per plutraktado de informo al radiostacioj pri faktoj pri Esperanto. Ekde decembro oni povas aĉeti la diskon en hispanaj magazenoj por de 2 300 ĝis 3 200 pesetoj (ĉ. 125 - 175 svedaj kronoj).

Malgraŭ telefonado al iuj el la plej grandaj vendejoj de kompakta diskoj en Stokholmo, mi ne sukcesis trovi la diskon. Sed se multaj Esperantistoj pripetus ĝin kaj de la vendejoj kaj de la ra-

dio, kiel proponas la revuo *Esperanto*, oni verŝajne baldaŭ ektrovos ĝin ankaŭ ĉi tie en nia lando.

Red

**Jam 35 esperanto-  
gazetoj en  
la interreto**

Meze de marto al la listo de esperanto-gazetoj, kiuj estas konsulteblaj en TTT, la Tutmonda Ter-Teksaĵo, aldoniĝis la 35-a. Tio estas "Ĉizilo", farata ĉe la universitato de Kostariko. La listo aperas kadre de Virtuala Esperanto-Biblioteko (VEB) kaj estas trovebla je la adreso [www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html](http://www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html).

La gazetoj kaj bultenoj uzas la interretan medion en malsamaj manieroj:

de plena enhavo de ĉiu unuopa numero, al publikigo de elektitaj artikoloj, aŭ nur baza prezento de la gazeto, eventuale kun aktuala enhavtabelo. La interretaj eldonoj ne celas anstataŭigi la presitan gazeton, sed vastigi la legantaron, precipe ekster sia propra lando aŭ regiono. Kelkfoje ne la plej lasta numero estas legebla, sed la enhavo de pli fruaj numeroj.

Kelkaj el la publikaĵoj en la listo aperas nur interrete; ili do ne havas ian paperan eldonon. Ne pro tio la enhavo en ili estas malpli interesa. Ili estas kutime malfermaj al kunlaborado kaj aldonas novajn erojn iom post iom.

Aldone al la 35 esperanto-gazetoj estas troveblaj ankaŭ kvar nacilingvaj bultenoj (dana, hispana, nederlanda kaj sveda) kun novaĵoj pri esperanto. Supozeble pliaj aperas tra la mondo kaj povus ankaŭ esti en tiu listo.

inko

**NEKROLOGE**

**Eugen Rytenberg**

Eugen Rytenberg mortis la 21-an de januaro 1997 en Upsalo, Svedio. Li estis elstara Esperantisto, multjara membro kaj delegito de UEA, membro de Sveda Esperanto-Federacio kaj la Upsala Esperanto-Societo.

Eugen estis naskita en Varsovio la 14-an de aprilo 1906. En la dudekaj jaroj li studis en Francio kaj tie fariĝis teksta inĝeniero. (Lia avo Benjamin Rittenberg estis fondinta tekstan fabrikon en Varsovio.) En 1939 li fuĝis antaŭ la germana invado kaj sukcesis atingi Rumanion, kie li ankaŭ trovis laboron kiel inĝeniero. En 1947 li petis vizon kaj al Francio kaj al Svedio. La sveda vizo alvenis unue, kaj ekde tiu jaro li loĝis en Svedio, unue en Stokholmo.

En la upsala klubo ni sciis ke Eugen iam vidis la aŭtoron de Esperanto. Li rakontis ke li ĉeestis interparoladon inter tiu ĉi kaj Antoni Grabowski. El tiu konversacio li memoris la frazon "Nigras literoj sur blanka papero", kiun Grabowski diris al li, montrante gazeton. Tiam li estis tre juna knabo; li ja estis precize dekunu jara kiam Zamenhof mortis.

Fakte Eugen estis parenco de Ludoviko Zamenhof, per bo-rilato. Nome lia patro Felikso Rittenberg estis frato de Helena Rittenberg, la edzino de Felikso Zamenhof, siavice frato de Ludoviko. Li kaŝis tion por ni. Tamen en 1985 li "konfesis" kiam mi trovis la nomon Rittenberg en la libro de N. Z. Maimon, *La kaŝita vivo de Zamenhof*, Tokio 1978, paĝo 100. (\*)

En 1987 tiu parenceco fariĝis tute

oficiala kiam li kaj lia edzino kaj filo estis invititaj de la pola ŝtato partopreni la jubilean kongreson en Varsovio.

Christer Kiselman

(\*) Cetere mi povas korekti informon en tiu libro: en piednoto sur la paĝo 100 estas skribite ke Helena Rittenberg "estas supozeble fratino de D-ro Benjamin Rittenberg." La vero estas ke ŝi estis filino de Benjamin Rittenberg, kiu cetere ne estis doktoro. Tion diris al mi Eugen Rytenberg mem la 24-an de aprilo 1985.

**Charlott Andersson**

La 15-an de februaro mortis Charlott Andersson, edzino de la SEF-kasisto Börje Andersson, Skövde.

Charlott kaj Börje renkontiĝis dum esperantoaranĝo en Guyla en Hungario, ekamiĝis kaj en 1987 geedziĝis en Budapeŝto. Dum 10 jaroj ili poste vivis en Skövde kaj multe partoprenis la esperantistan vivon en Skövde kaj dum multaj kongresoj.

La ĉefa profesio de Charlott estis muzikinstruistino, sed ŝi estis ankaŭ edukita librotenisto, kaj dank' al tio ŝi povis multe helpi la edzon en la kasista librotenado de SEF.

Multaj estis la esperantistaj amikoj, kiujn Charlott ekhavis dum siaj jaroj en Svedio. Kiam grava malsano trafis ŝin, ŝi kuraĝe daŭrigis sian karan esperantistan vivon kaj interalie multe kontribuis al la aranĝo de la SEF-kongreso en Hjo.

**Karlskoga  
Folkhögskola**

Karlskoga Folkhögskola anordnar kurser i esperanto i minst tre nivåer 1997.

|                   |               |
|-------------------|---------------|
| Nybörjarkurs      | 20/8 - 15/10  |
| Fortsättningskurs | 27/10 - 19/12 |
| Sommarkurs        | 9/6 - 20/6    |

Sommarkursen omfattar tre eller fyra nivåer. I år kommer sommarkursen att genomföras på *Esperantogården i Lesjöfors*, med möjligheter till excursionser i en vacker och intressant omgivning. Utöver sex dagliga lektioner kommer deltagarna på kvällarna att vara med om föredrag, video, dockteater, en utländsk trubadur m.m.

I Karlskoga bor deltagarna i moderna enkelrum. Det finns gemensamt kök, matsal, sporthall, datorrum m.m. I nybörjarkursen används esperanto från början som arbetspråk. Kursdeltagarna har tillgång till språklaboratorium.

En åttaveckorskurs kostar inklusive boende och mat (ej kvällar/veckoslut) 5.300 kr.

Kurslitteraturen kostar ca 150 kr.

# Malaperantaj kulturoj

## Ne Eva sed anakondo

La popolo Ese Ejja aperis proksime al la sankta monto Bahuaĵja. Ili malsupreniris de la ĉielo, kie la homoj neniam mortas nek malsaniĝas. Ili venis al la tero per ŝnuro el kotono. Ili venis por ekkoni la teron kaj vidi kia ĝi estas. Ili malsupreniris kun fermitaj okuloj pro timo fali. Ili venis kun plantoj de banano, semoj de maizo, papajo kaj aliaj plantoj. La unua kiu malsupreniris estis maljuna viro kun barbego. Li kriis al tiuj pli supre dirante ke la tero estas bona kaj ke ili malsupreniru. Ĉi tiu maljunulo venis sen edzino, kaj du aliaj viroj ankaŭ malsupreniris sen edzinoj. La aliaj havis siajn edzinojn.

Ili estis trovitaj de malbonaj spiritoj, kiuj diris al ili ke ili ne povis resti en la regiono de la monteto, kaj ke ili foriru malproksimen. Fine la du viroj sen edzinoj edziĝis kun du anakondoj kaj de ĉi tiuj geedziĝoj naskiĝis la popolo Ese Ejja. Poste la serpentoj reiris al la rivero.

## La rivera popolo

La supra rakonteto estas elĉerpo el la mito pri la origino de la malgranda bolivia popolo Ese Ejja, kiel oni trovas ĝin en Gente Riberena (Rivera Popolo) de la uson-bolivia antropologo Homer Frestone. La Ese Ejja-popolo loĝas en kelkaj tre malproksimaj vilaĝoj en norda Bolivio. Estas la riveroj kiuj unuigas ilin. Same kiel la sledoj helpis niajn svedajn prapatrojn veturi sur la neĝo inter la vilaĝoj separitaj de arbaroj, la Ese Ejja-popolo utiligas kanuojn por intervilaĝa komunikado. La kanuon oni fabrikas kutime el trunko de cedro, la ligno el kiu ni eŭropanoj produktas cigaruojn. Estas la laboro de unuopa viro konstrui kanuon. Tiu kiu ne havas propran kanuon povas prunti de posedanto de kanuo, sed nur unu tagon. La kanuo signifas prestiĝon por la posedanto. Ĝi ebligas al li montri sian bonvolon; pruntedonante ĝin, veturigante homojn kaj uzante ĝin ĝuste kaj neriproĉeble. Li ankaŭ estas la kontaktpersono por fremduloj. La kanuo fortikigas la virojn de la posedanto, ĝi estas virseksa simbolo.

La riveroj sur kiuj la kanuoj sin movas, estas simboloj ineksaj. Pli kompleksa estas la anakondo, simbolo kiun ni perceptas kiel virseksan, en ĉi tiu kulturo estas ineksa (Memoru la miton). La serpento en la akvo de la rivero signifas abundecon de fiŝoj, t.e. fekundeco. La fiŝoj do simbolas la filojn.

## La spiritoj

La transmorta rivero de la Ese Ejja-popolo nomiĝas Cueijana. Ĝi estas tre malproksima, la vojaĝo tien daŭras du jarojn. Laŭ la vojo tien troviĝas multaj sovaĝaj bestoj; jaguaroj, anakondoj, kajmanoj kun kornoj k.t.p. La homoj kriis kiam ili ekvidas la bestojn antaŭ si. Se la bestoj englutas la vojaĝanton, la manĝito reviviĝas. En Cueijana estas fajro kie la ĉefspirito volas kuiri ilin por manĝi. La rivero Cueijana estas varma loko plena de insektoj. Estas tre larĝa rivero kovrita de nebulego.

Kiam mortinto estas enterigata, oni metas maĉeton, pafarkon kun sagoj aŭ ĉasfusilon kt.p. en la tombon por ke li povu defendi sin survoje al Cueijana. La domon kaj aliajn posedaĵojn de la mortinto oni kutimis detruji aŭ jeti en la riveron. Oni forigis la memoraĵojn de li por faciligi la forgeson. La memoro pri mortinto estas kiel spirito, ĝi ĝenas la vivantojn.

Foje post la morto kaj enterigo de viro, lia fantomo nokte serĉis parencon de la mortinto por kunpreni lin al la tombo. La vivanta viro vekigiĝis kaj vidis

la ombrojn, t.e. la spiritojn, alproksimiĝi kaj kapti lin penante tiri lin el la hamaĉo. Estis batalo kaj la viro kriis pri helpo, kiun li ricevis de la homoj kiuj vekigiĝis.

Sed oni ankaŭ povas kontraŭbatali la spiritojn per pli rafinitaj metodoj. Kiam infano malsaniĝis grave, la vizitantoj al la hejmo povas ridi kaj agi tre facilanime. La spirito kiu kaŭzis la malsanon sentas la indiferecon de la ĉeestantoj antaŭ la ebla morto de la infano, kaj pensas ke la infano ne gravas al ili kaj tial ĉesas aflikti ĝin.

## La lingvo

Laŭ la mito pri la origino de la popolo Ese Ejja la bestoj kiel fiŝoj kaj birdoj povis paroli la lingvon de la Ese Ejja. Tiu lingvo apartenas al la sama grupo kiel la lingvo de la Tacana-popolo. La lingvofamilio estas la Ge-Pano-Kariba. Do ĝi tre malsimilas aliajn lingvojn en Bolivio kiel la lingvojn de la altebenaĵo, kiuj estas ankaŭ multe pli grandaj laŭ nombro da parolantoj.

Red

# KOTIZOJ DE UEA

|           |  |     |
|-----------|--|-----|
| <b>MA</b> | <i>Membro-abonanto, kiu ricevas la revuon Esperanto kaj la Jarlibron</i> | 400 |
| <b>MJ</b> | <i>Membro, kiu ricevas la Jarlibron</i>                                  | 160 |
| <b>MG</b> | <i>Membro kun Gvidlibro</i>  | 70  |
| <b>SZ</b> | <i>Societo Zamenhof</i>  | 800 |

Bv. pagi al la poŝtgira konto "Esperantoförbundet, Specialkonto" 14 74 29-5.

La saman poŝtgiran konton vi uzu se vi volas aboni revuojn. Informojn tiurilate vi ricevas de Lisbet Andreasson per tel. 0415-50 152.

# Malaperintaj bestoj

## La pošlupo

La pošlupo estas la plej granda el ĉiuj karnomanĝaj poŝbestoj. La longo de la trunko estas pli ol unu metro, la vosto longas 50 cm. Maljunaj virbestoj laŭdire fariĝas relative multe pli grandaj, entute ĉirkaŭ 1,9 metrojn, laŭsupoze. La mallonghara malkompakte kuŝanta felo estas grizbruna kun 12 ĝis 14 nigraj transversaj strioj dorse...

La pošlupo havas sian loĝlokton en Tasmanio. Dum la unua periodo de la Eŭropa koloniado ĝi estis tre multnombra, malfavore kaj ĉagrene al la posedantoj de dombestoj, ĉar ĝi kutimis fari plurajn vizitojn ĉe iliaj ŝafaroj kaj kortbirdaroj. Poste la pafarmiloj forpelis ĝin pli kaj pli, kaj nun ĝi estas forpuŝita al la interno. Tie oni ankoraŭ trovas ĝin en kelkaj montaraj regionoj, plej multnombro je altitudo de ĉ. 1000 m super la nivelo de la maro. Krevoj en rokoj, fendegoj preskaŭ ne alireblaj al la homo, naturaj aŭ de ĝi mem fositaj profundaj kavoj konsistigas ĝiajn rifuĝejojn, el kiuj ĝi iras por rabi. Ĝi estas nokta besto kaj altgrade evitas la taglumon. La ĉiama tremado de la palpebroj malkaŝas la ekstreman sentemon de la okuloj: neniu strigo povas pli zorgeme peni protekti la okulon kontraŭ la malloga brilo de la lumo. Probable estas pro ĉi tiu sentemo al lumo ke ĝi estas malrapida kaj mallerta tage, sed kontraŭe viveca, vigla kaj eĉ sovaĝa kaj danĝera nokte, ĉar ĝi ne evitas lukton kaj ofte finas la batalon venkinte, estante ĝiaj solaj malamikoj la hundoj. Kvankam ĝi ne estas la plej sovaĝa el ĉiuj rabmarsupiuloj, ĝi superas ĉiujn aliajn membrojn de sia familio



pri forto kaj braveco kaj meritas nur pro tio sian nomon. Ĝi okazigas aŭ okazigis kiam ĝi estis pli multnombra, rilate al sia grandeco, sammultaj damaĝoj kiel sia norda samnomo.

La manĝaĵo de la pošlupo konsistas el ĉiuspecaj malgrandaj bestoj, kiujn ĝi povas kapti kaj venki, el tiel vertebruloj kiel senvertebruloj, el insektoj kaj moluskoj, suben ĝis la radiolarioj. Kie la montoj atingis la marbordon kaj la kolonianoj ankoraŭ ne enradikiĝis, ĝi nokte ĉirkaŭvagis la bordon, prilaras kaj elserĉas plej diversajn bestojn, kiujn la ondoj suprenĵetis. Lamembrankuloj kaj aliaj moluskoj kiuj troviĝas multnombro ŝajnas esti ĝia ĉefa manĝaĵo, se ne tiel bone okazas ke la maro alportas frandaĵon, suprenĵetante duonputrintan fiŝon aŭ fokon. Sed la pošlupo ankaŭ entreprenas malfacilajn ĉasojn. Sur la herboriĉaj ebenaĵoj kaj en la malaltaj parkosimilaj arbaretoj ĝi persekutas la rapidan arbedkanguruon kaj en la riveroj kaj lagetoj la ornitorinkon, malgraŭ ĝia naĝ- kaj plonĝkapablo. Kiam ĝi estas eksterordinare malsata ĝi nenion malŝatas kaj eĉ ne retiriĝas de la penetranta armilo de la haŭto de erinaco.

Oni kaptas la beston per kaptiloj aŭ ĉasas ĝin per hundoj, kiam ĝi etendas siajn ĉasekspediciojn al la novkulturejoj. Kontraŭ la hundoj ĝi komprenas defendi sin kaj tiurilate prezentas sovaĝecon kaj malicon, kiu ne estas proporcia al ĝia malgrandeco. Se nepre neceso ĝi baraktas per la kuraĝo de malespero kaj povas okupi tutan hundaron."

Tiel ĉi priskribis Alfred Brehm la pasintan jarcenton en La Ilustrita Vivo de

la Bestoj la pošlupon (Trad. de la red. el la sveda eldono de 1930, 6a volumo p. 440-441). La aŭtoro uzis la prezencon priskribante la specion. Hodiaŭ oni ne plu povas, la lasta pošlupo mortis jam antaŭ jardekoj. La specio ekstermiĝis. La bela tigre striita marsupiulo por ĉiam estas for kaj de kontinenta Aŭstralio, kie ĝi antaŭ la apero de la homo kaj ĝiaj sovaĝiĝintaj hundoj, la dingoj, abundis, kaj de Tasmanio, ĝia lasta rifuĝejo.

## Aperindaj bestonomoj

La nomon pošlupo la verkinto de ĉi tiu artikolo eltrovis malhavante oficialan nomon laŭ Plena Ilustrita Vortaro. Per la artikolo mi volas proponi kelkajn nomojn de bestoj malaperintaj dum la epoko de la homo. Kelkaj jam troviĝas, sed aliajn ni devas inventi. La placenta "samnomo" kiun mencias Brehm estas ja ankaŭ konata kiel besto minacata de ekstermo en nia lando. Eĉ se ĝi malaperus komplete el ĉiuj landoj ĝi tamen postlasus multajn priskribojn kaj sciojn. Mi kredas ke la homo almenaŭ havas la devon honorigi siajn viktimojn per nomo kaj memoro kiel decas al forpasintulo. Certe la esperantistaro povas prezenti pli kompetentajn proponantojn pri bestonomoj ol mi. Sed ĉu iu vere ion jam proponis rilate al malaperintaj bestoj?

Jen listeto kun kelkaj bestonomoj (\* proponoj de la red. La nomon granda aŭko proponis ankaŭ M. Markheden):

Kutime bestonomoj en esperato estas tradukoj de nomoj en latino. Ekzemple la granda paruo nomiĝas en latino Parus major kaj la negra paruo estas Parus ater. Same mi tradukis la nomon Discoglossus nigriventer per nigroventra diskolango. Kelkfoje la latina nomo ne estas kontentiga por vivanta lingvo kiel esperanto. Oni apenaŭ povas imagi la bestonomon ansera ansero en esperanto, sed en latino la griza ansero nomiĝas Anser anser. En tiaj kazoj esperanto estas helpita de aliaj lingvoj.

Povas esti ke esperanto nur heredis la genronomon de latino, sed konstruis propran specinomon, kiel ekzemple la nordlanda leporo por la latina Lepus timidus.

Oni ankaŭ kelkfoje transprenis la specinomon latinan anstataŭ la genronomon al esperanto. Tiel okazis pri la papilio Nymphalis antiopa, kiu fariĝis antiopo (Laŭ A. Cherpillod, Nepivaj vortoj). Eĉ raso povas doni nomon al

| Latino                    | La sveda                        | Esperanto                   |
|---------------------------|---------------------------------|-----------------------------|
| Thylacinus cynocephalus   | pungvarg                        | poŝlupo*                    |
| Equus quagga              | kvagga                          | kvago*                      |
| Bos primigenius           | uroxe                           | uro                         |
| Mastodon ( <i>genro</i> ) | mastodont ( <i>genro</i> )      | mastodonto ( <i>genro</i> ) |
| Campephilus principalis   | elfenbensnåbb                   | eburbeka pego*              |
| Alca impennis             | garfågel                        | granda aŭko*                |
| Raphus cucullatus         | dront                           | dido                        |
| Dinornis ( <i>genro</i> ) | moafågel ( <i>genro</i> )       | dinornito ( <i>genro</i> )  |
| Ectopistes migratorius    | vandringsduva                   | migra kolombo*              |
| Discoglossus nigriventer  | skivtungsgroda ( <i>genro</i> ) | nigroventra diskolango*     |
| Lagochilla lacera         | sugfisk ( <i>genro</i> )        | leporlipa suĉfiŝo*          |

esperanto. Do Corvus corone cornix fariĝis en esperanto korniko. Kelkfoje esperanto prenis la bestonomon ne de la scienca nomo en latino, sed de alia vorto en latino aŭ alia lingvo. La aspido havas la sciencon nomon Naja haje kaj la najtingalo nomiĝas en latino Luscinia luscinia.

Kiel aliaj lingvoj esperanto povas transpreni bestonomon eĉ de loka lingvo de kie oni trovas la beston. Ekzemplo pri tio estas la jaguaro kies nomo en latino estas Felis onza, dum la origino de la vorto en esperanto estas vorto pri karnomanĝantaj bestoj en tupigvarania lingvo. La kvago havas sian nomon de la hotentota ("kojkoja") lingvo kaj uro venas el ĝermanaj lingvoj.

Dum la progreso de sciencaj konoj oni ŝanĝis la sciencajn nomojn de bestoj. La rezulto povas esti ke esperanto retenas malnovan nomon kiu ne devenas de la nuntempa scienca nomo latina. Ekzemplon pri tio donas la listeto de ekstermitaj bestoj. La dido nomiĝis en latino Didus ineptus. Esperanto povas ankaŭ per kunmetita vorto inkluzivi la latinan kaj genro-kaj specinomojn. Cervus dama fariĝis damcervo. Tamen plej ofte oni ne trovas specinomon en PIV.

### La eburbeka pego

Fine ni legu kion skribis Alfred Brehm (vol. 9 p. 146-149) helpe de Audubon kaj Wilson pri la eburbeka pego:

"La longo estas 46 cm, la flugillongo 26 cm kaj la vostolongo 19 cm. La plumaro estas brile negra. Kelkaj plumoj super la nazotruoj male blankaj, kaj la saman koloron havas mallarĝa strieto, kiu komenciĝas dorsmeze kaj etendiĝas laŭ la flankoj de la kolo kaj ŝultroj plilarĝiĝante rimarkeble. Ankaŭ la man-kaj brakplumoj estas blankaj. La tempioj kaj la akra longa tufo kaj la nuko estas brile skarlataj. La iriso estas flava, la beko kornoblanka kaj la piedo malhele plumbgriza. La femalo sin distingas de la masklo per sia nigra tufo...

La flugo de ĉi tiu birdo estas tre alloga, kvankam ĝi malofte etendiĝas super pli ol 100 m, se la pegego ne devas flugi trans larĝa rivero. Tiam ĝi preterflugas laŭ profundaj kurboj, dum ĝi jen etendas la flugilojn tute jen batas per ili por gajni rapidecon. La movo de arbo al alia, eĉ se ili kreskus plurcentajn metrojn unu de la alia, estas plenumita per ununura svingo, dum kiu la birdo laŭiras belan kurbon. Ĉimomente ĝi disvolvas la trunko kaj suprengrimpos oni aŭdas ĝian rimarkindan, klaran, laŭtan kaj plaĉan blekon je longa distanco, ĉ. duona mejlo. Ĉi tiu bleko aŭ ĉi tiu logsono, kiun oni povas priskribi per la silabo "pet", kutime estas ripetata tri fojojn, sed la birdo aŭdigas ĝin tiel ofte

, ke oni povas diri ke ĝi kriis la tutan tagon kaj nur kelkajn minutojn silentiĝas. Bedaŭrinde la persekutado al ĝi estas faciligita de ĉi tiu karakterizaĵo, kaj tro grandan motivon por persekutado estas donita de la erara opinio, ke ĝi detruas la arbarojn. Aldone ĝiaj belaj tufplumoj estas populara ornamaĵo ĉe la indianoj, kiuj tial fervore persekutas la pegojn. Turistoj havas pasion por ĉi tiu ornamaĵo kaj aĉetas la kapon de la birdo de la ĉasantoj kiel memoron. Mi vidis indianestrojn, kies tutaj talizonoj estis dense dekoritaj per bekoj kaj tufoj de la eburbeka pego...

Se ĝi estas vundata kaj falas surteren, ĝi kiel eble plej rapide penas atingi arbon kaj suprengrimpos per la plej alta rapideco al la supraj branĉoj de ĝi, kliniĝas suben kaj kaŝas sin tie. Suprengrimpane ĝi spiras ĉirkaŭ la trunko kaj eligas je preskaŭ ĉiu salto sian "pet pet pet" sed eksilentas tuj, kiam ĝi atingis sekuran lokon. Se ĝi fariĝis morte vundita, ĝi tiel ofte sin krampas al la arboŝelo, ke ĝi restos tie pendanta plurajn horojn post sia morto. Se oni prenas ĝin per la mano, kiam ĝi ankoraŭ vivas, ĝi kaŭzas vundegeojn sur la beko kaj la ungegoj sed eligas samtempe malgajajn kaj lamentajn kriojn.

Wilson provis teni eburbekan pegon kaptita en kaĝo, sed trovis ke tio implicas malfacilaĵojn. La koncerna birdo estis maljuna kaj estis ĵus vundita kaj

kaptita. Ĝi kriis kiel infano laŭ la maniero priskribita supre kaj timigis tial la ĉevalon de Wilson, tiel ke ĝi metis sian rajdanton en danĝeron de morto. Kiam li kun sia krianta birdo rajdis tra la stratoj de Wilmington, ĉiuj sinjorinoj time kuris al la pordoj aŭ fenestroj por vidi kio estis la kaŭzo de la terura bruo, kaj ekster la gastejo li devis toleri veran krucefadon de demandoj.

Fine li loĝigis la eburbekan pegon en sian ĉambron kaj lasis ĝin por prizorgi sian ĉevalon. Kiam li revenis post ĉ. duona horo, li trovis ke la birdo preskaŭ liberigis sin. Ĝi suprengrimpis la fenestrokadron kaj preskaŭ traboris la vandojn de la ĉambro. Kiam Wilson volis desegni ĝin, li perdonis ĝin pri la provo eskapi kaj katenis ĝin, por eviti ri-

peton de simila afero, per ĉeno ĉe tablo de mahagono. Poste li denove lasis la ĉambron por akiri manĝon al sia protektato. Kiam li revenis, li aŭdis jam de la ŝtuparo, ke la pego denove estis laboranta, kaj kiam li eniris la ĉambron, li vidis kun teruro ke la tablo staris tripede anstataŭ kvarpiede. Kiam li desegnis, la nevola birdo kaŭzis al li plurajn vundojn kaj entute montriĝis tiel liberamanta, ke li pli ol unu fojon konsideris rekondi ĝin al ĝiaj arbaroj. La manĝaĵon, kiun ĝi ricevis, ĝi tute malkceptis, kaj jam dum la tria tago pereis pro la mallibereco.



Red

## ESPERANTOREKLAMADO AL SENLABORULOJ

Via respondo povas helpi

"Esperanto ne helpos min akiri laboron!" Aŭ: "...ĝi ne helpos min en mia laboro (se iam mi havos laboron)!" Tiaj estas la malvarmduŝaj komentoj de finnaj senlaboruloj, kiam ili ekscias ke oni instruas esperanton ĉe Helsinkiaj Senlaboruloj. Venontan aŭtunon mi metos serion de reklamoj sur la anonctabulon por montri al ili, ke esperanto utilas ankaŭ en la laborvivo.

Do ĉu vi povas respondi al la sekvaj demandoj?

**Ĉu esperanto iam helpis vin en via laboro? Kaj kiel? Ĉu ĝi eĉ ebligis vin trovi laboron?**

Bonvolu respondi esperante aŭ svede al:

R.J. Milton  
Kulosaaren Puistotie 38 - 1  
FIN - 00570 Helsinki, Finnlando

## ÖVERSÄTTNINGSPROGRAM för datorer

mellan svenska och esperanto är inte längre bara en framtidsvision. Assisterad datoröversättning innebär att en text översätts halvautomatiskt. Datorn frågar ibland användaren vilken betydelse ett flertydigt ord ska ha i texten. Programmen har ännu sina begränsningar med avseende på ordförråd och förmåga att översätta olika meningstyper. Nu erbjuder Tramond KB program för 90 kr (tre st. för 120 kr).

Tramond KB  
Box 33  
740 10 Almunge  
tel. 018 - 38 91 33  
pg 56 67 86 - 0



## KLUBO 1000

Leif Nordenstorm,  
Boden, 1000 kr  
Karl Rönningberg,  
Västerfärnebo,  
1000 kr  
Sten Broman, Skövde,  
1000 kr  
Ingemar Nordin,  
Stockholm, 1000 kr  
Klubo Esperantista de  
Malmö, 1000 kr

## KLUBO 100

Jan kaj Anna-Greta  
Ströme, Malmö,  
200 kr  
Alice kaj Nils  
Johansson,  
Norrköping, 200 kr

## DONACOJ

**MEMORE AL  
LENNART ÅBERG**  
Esperanto-Alliansen,  
Göteborg, 200 kr  
Märtha Andreasson  
kaj Majken Svensson,  
Göteborg, 200 kr  
Ann-Christine  
Kron Dahl, Linderöd,  
200 kr  
Nils-Erik kaj Kerstin  
Kristofferson,  
Stockholm, 500 kr

**MEMORE AL ARVID  
JOHANSSON,  
HUSKVARNA**  
Anna-Maria Lange,  
Lund, 100 kr

**MEMORE AL  
GÜNTHER  
SCHAEDEL**  
Sigurd Olsson,  
Strömsnäsbruk,  
200 kr

**CETERAJ**  
Alingsås Esperanto-  
klubb, 432 kr  
Anonimaj donacoj,  
500 kr

SEF dankas por ĉiuj  
donacoj.  
Pliaj donacoj estas  
bonvenaj al poŝtĝiro  
20 12-3

# La Kultura Esperanto-Festivalo '96

6 – 11 aŭgusto 1996

Tiu kvina festivalo por la dua fojo okazis en Kopenhago, la Eŭropa kultura ĉefurbo. Inter la multaj kulturaj ofertoj por la loĝantoj kaj turistoj, ankaŭ okazis tiu **Kultura Esperanto Festivalo**, kiu estas honorigita per la aŭspicio de s-ro Daniel Tarschys, la Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Konsilio.

La esperantistoj celebris dum KEF-5 du jubileojn:

1. La 100-jara jubileo de la esperanta teatro. Jerzy Fornal, konata pola aktoro, brile prezentis la teatraĵon "**La Jubileo**", verkita de la anglo Harold Brown.
2. Antaŭ 10 jaroj okazis la unua KEF en Uppsala, kiu estis pruvo de la junaj Stokholmaj esperantistoj montris kapablon organizi festivalon de originala esperanta muziko, teatro kaj aliaj esprimoj de kulturo.

Dum tiu 5-a KEF la 7 organizantoj bone sukcesis daŭrigi tiun tradicion kaj eĉ ofertis novaĵojn por servi la kulturan progreson kaj la emon de la publiko aktive partopreni.

Mi mencias la **Talentan Posttagmezon**, dum kiu junaj promesplenaj artistoj povis sin prezenti.

Due la **Literatura Kafejo** (premiro), dum kiu oni povis diskuti kun 3 verkistoj iliajn verkojn. La verkistoj estas István Nemere el Hungario, Spomenka Stimec el Kroatio kaj Paul Thorsen el Danio.

Trie la **Metiejoj**. Koruso sub gvido de la kantgrupo **Kajto** kaj la Bulgarino Zdravka ekzercis diversĝenrajn kantojn kiel dum la UK-oj. La rezulton ni aŭdis dum la **Talenta Posttagmezo**.

Alia metiejo estis la **Artista Metiejo**, dum kiu la partoprenintoj ornamis tabularojn ktp.

La tria metiejo, la **Interreta Komputilejo** iom fiaskis, ĉar troviĝis nur 2 komputiloj en malgranda ĉambro. La ideo estis konatiĝi kun la ideoj, kiujn donas la "komunikadan socion de la estonteco", sendi retroŝton, kaj fari propran hejmapaĝon. Espereble tiu ebleco estos pli bone organizita dum la venonta KEF aŭ dum alia aranĝo.

La muziko estis kiel antaŭe tre grava programero. Komence de la vespero muziko ankaŭ por ni mezaĝuloj, kiuj abunde partoprenis, estis agrabla kaj ne tro laŭta. Estis la muziko de **Kajto**, de **Nata kaj Andreo Berce** kaj de **Ĵak le Puil**.

La du ekster-Eŭropaj muzikgrupoj

**La Afrika Espero** kaj **Flávio Fonseca** el Brazilio donis specialan ĉarmon kaj mezbruon. Ĉirkaŭ meznokto dum **Klub' Zamenhof** okazis la bruego de **Jomo kaj la Mamutoj**, **Nigra Espero** kaj **Persone**.

Ofte ni pliaĝuloj ne plu estis en la KEFejo dum tiu tempo kaj ĝuis la etoson en la urbocentro aŭ de Tivoli (ni ricevis bileton al tiu amuzejo).

Ni devas konsideri ke KEF estas junulararanĝo kaj ke ankaŭ brua muziko nuntempe estas parto de kulturo. La organizantoj tamen bone pensis pri ni, kiuj havas aliajn dezirojn. La teatroj kaj aliaj pli trankvilaj programeroj okazis aliloke en la proksimeco.

La ĉefa festivalejo ne estis tiel komforta, kiel oni volas deziri: estis iama fabrihalo. Se vi volas fuĝi de la bruo al apuda ĉambraĉo, ne troviĝis tie sufiĉe da sidlokoj. Ĝenerale regis tie granda "tohuvaĵo". Alia ĝeno estis, ke la servantoj en la kafejo ne estis esperantistoj kaj prezentis ne-esperantan muzikon dum la paŭzoj. Ili ne volis ke esperantistoj okupiĝu pri la kafejo. Tial ili estus ŝenlaboraj.

Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo por ni multpostulemu ne estis tiel alloga: Je la "fino" de Amager, kie KEF okazis, troviĝas multaj industrietoj kaj vagonoj de la iama **Amager Fervojo**, do alivorte "ĥaosa ĉirkaŭaĵo". Tiu loko certe influas la luprezon de la ejoj kompare kun la lokoj en la urba centro.

Sed, dank' al tiu **Amager Fervojo** ni havis tre unikan travivaĵon, kiun oni

verŝajne ne povas ripeti dum la venontaj KEFoj. Dank' al la fakto, ke Kopenhago estas la Eŭropa kulturĉefurbo, oni denove ekfunkciigis la fervojon dum la semajnfinoj inter Kastrup kaj Amagerbrogade, kie troviĝas la haltejo "Stokholmo" dum KEF.

Ni partoprenintoj de KEF vojaĝis en tiu trajno kiam la diversaj artistoj regalis nin per spontana muzikprezentado.

Ĉe alia haltejo ni eliris por atendi la lastan trajnon. Tie okazis demonstracio de Latinamerikaj dancoj kaj ni eĉ estis instruitaj. Andreo Berce prizorgis alian dancmuzikon.

Tio estis ege agrabla surprizo dum agrabla vetero.

Mi ankaŭ devas mencii, ke krom la teatro de Jerzy Fornal, ankaŭ okazis teatro de du Italoj kun la nomo **Genepoj de Cindrulino**. Ili prezentis **Amo Made in Taiwan** kaj **Diskanale**. Iu alia teatro estis klaŭn- kaj pupteatrokun la nomo **Teatro en Kofro** de Tomas Plaszky. Li prezentis sian teatron por la tria fojo dum KEF kun ŝanĝoj. Speciale por la multaj infanoj, kiuj partoprenis, estis amuza ĉi tiu prezentado.

Nun restas nur mencii, ke la nombro de la partoprenintoj ĉifoje estis 230 el 35 landoj. Dum KEF-4 havis 156 kaj KEF-3, kiu okazis en Västerås, havis 129 partoprenintojn. Stokholmo estos la Eŭropa Kultura Ĉefurbo por la jaro 1998. Ĉu denove KEF okazos en Svedio kaj en ties ĉefurbo?

Wim Posthuma

## UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Adelaide, 19/7-26/7 1997

|   |          |
|---|----------|
| Icke direktmedlem i UEA                                   | from 1/4 |
| Direktmedlem i UEA (ej MG)                                | 1920:–   |
| Medföljande, handikappad eller ungdom                     | 1540:–   |
| (under 30 år 1/1 1997) som inte är medlem i UEA           | 1160:–   |
| Medföljande, handikappad eller ungdom som är medlem i UEA | 780:–    |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter den 31 december 1976 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgifterna komma att justeras uppåt.

Anmälningssblanketter för kongressen kan beställas hos **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel. 0415/501 52**. Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29 – 5, Esperantoförbundet, Specialkonto.

# La "rigida lingvo"



La priskribo de Esperanto en La Granda Dana Enciklopedio (*Den Store Danske Encyklopædi*) indignigis danajn Esperantistojn kaj iniciatis debaton en la unua numero ĉijare de la dana revuo *Esperantonyt* (Esperantonovaĵoj).

Preben Bagger rimarkis la influon, bonan aŭ malbonan, kiun havas ne-Esperantisto skribante pri Esperanto. Li vidas la avantaĝon ke la ne-Esperantisto povas skribi neŭtrale, sed la malavantaĝon ke li/ŝi ne havas la neprajn spertojn por vera konono de la lingvo. Kontraŭe la Esperantisto legis la literaturon, konas la esprimeblecojn, la kulturon kaj evoluon. Sed la demando estas ĉu li/ŝi estas gvidata de sia partieceo.

Por skribi la artikolon de la Enciklopedio oni elektis ne-Esperantiston. Tiu procedo, skribas Bagger, verŝajne estas racia pri lingvoprojektoj. "Sed kiam temas pri Esperanto, funkcia lingvo en natura evoluado, devas nepre esti handikapo kaj fonto de malcerteco ne scii la lingvon."

La verkinto de la artikolo en *Esperantonyt* konstatas ke la enciklopedio objektivite priskribas Esperanton ĝis ĝi, kiel estus fakto, asertas ke "la lingvo havas rigidan karakteron." La legantoj de la enciklopedio ne povas ekscii ke elstaraj fakuloj pri Esperanto havas la kontraŭan opinion. Por konfirmi sian starpunkton Bagger citas kvar spertulojn pri Esperanto. Ekzemple la verkisto Edwin de Kock diris: "Esperanto estas kiel argilo en miaj manoj." La verkinto de la artikolo en la enciklopedio, Jan Katlev, respondos en la estonta numero de *Esperantonyt*.

## La artefarita lingvo

Eskil Svane prezentas en *Esperantonyt* kvar demandojn pri la priskribo de Esperanto en la enciklopedio.

1. Kial moderna enciklopedio uzas la arkaikan terminon artefarita lingvo kaj ne la nuntempan esprimon planlingvo?
2. Kial oni silentas pri Esperanto kiel kultura movado, rekonita de UNESCO, kun riĉa literaturo kaj gazetaro?
3. Kial en artikolo kun celo de objektiveco lasi al pledanto por tute malsama lingvoprojekto ("interlingvo") argumenti kontraŭ Esperanto?
4. Kial ne lasi al Esperantisto priskribi sian propran fakon, kiel ekzemple ĉinologo priskribas la ĉinan kulturon kaj lingvon?

Kiel komparo ni povus konsulti du aliajn enciklopediojn. La malnova dana enciklopedio *Salmonsens Konversationslexikon* de 1918 sub la kapvorto Esperanto komence informas ke "Esperanto estas unu el la plej bone konataj artefaritaj internaciaj helplingvoj." Sed ankaŭ la moderna sveda *Nationalencyklopedin* komencas sian artikolon pri Esperanto per "Esperanto unu el la lingvoj de la mondo, celanta al funkcio kiel la dua lingvo por ĉiuj, flanke de la gepatra lingvo."

Pri la dua punkto de Svane la du enciklopedioj ne mencias rekonon de UNESCO, sed literaturon kaj gazetojn.

Rilate al la tria kaj kvara punktoj, la artikolon en la sveda enciklopedio skribis Hartmut Traummüller, lingvisto kaj Esperantisto. Tiu de *Salmonsens Konversationslexikon* estis skribita de la profesoro O. Jespersen. Verŝajne aludas al la lingvisto Otto Jespersen, kiu favoris la lingvon Ido.

## La Jarlibro de UEA por vi

La *Jarlibro* de UEA estas tre konkreta pruvo pri la internacieco kaj multflankeco de la esperantomovado. Vi tie trovas informojn pri ĉiuj Landaj Asocioj, pri ĉiuj Fakaj Asocioj, pri la junulara organizo TEJO, pri estraranoj kaj komitatanoj de UEA. La Delegita Reto kiu ampleksas delegitojn en 87 landoj, klare montras, ke membroj de UEA posedas valoran kontaktreton en la tuta mondo.

Se vi havas emon informi kaj konvinki homojn ekster nia movado, la *Jarlibro* estas unu el la plej efikaj reklamiloj por vi. Ĝi havas oportunan formaton por trovi lokon en tekoj aŭ manŝakoj.

UEA estas grava organizo kaj ĝi meritas vian apogon, kaj vi bezonas la *Jarlibron*. MJ estas membrokategorio de UEA. MJ signifas membron kun *Jarlibro*. Pagu 160 kronojn al UEA kaj fariĝu membro kun *Jarlibro*. Pagu al la poŝtĝira konto 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet Specialkonto.

Estas interese seki la laboron por esperanto en la UEA-gazeto *Esperanto*. Ĉiumonate aperas informoj pri aktivecoj de esperantistoj diversloke en la mondo. Se vi volas legi tiun gazeton vi elektu membrokategorion MA - membro-abonanto. Kostas pli ol MJ. Kotizo por 1997 estas 400 kronoj, kaj vi ricevos la *Jarlibron* kaj la gazeton. Se vi estas du personoj en la familio kaj volas ke ambaŭ estu UEA-membroj, unu el vi povas fariĝi membro en kategorio MG (membro kun gvidlibro). Por tiu "familia kategorio" oni pagas nur 70 kronojn.

La UEA-delegitoj, kiuj troviĝas en la *Jarlibro*, ĉar ili volas helpi al aliaj UEA-membroj, estas rektaj reprezentantoj por UEA. Ili pro tio, aktive laboras por informi pri UEA. Svedio devus havi pli da delegitoj en pli da lokoj. Anoncu vin al Lisbet Andreasson se delegiteco interesus vin!

Lisbet Andreasson  
(ĉefdelegito por Svedio)

tel. 0415 - 501 52

Roland Lindblom

(delegito kaj prezidanto de SEF)

tel. 08 - 777 41 75

## ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

de Ebbe Vilborg

# 1 + 2 + 3 + 4 + 5

Kompleta en aŭtuno 1997

## Monaŭtomatoj en Grekio

La urbo Kavala situas en orienta Grekio, ĉe la Egea Maro. Multaj turistoj vizitas la urbon kun akvedukto de la 16-a jarcento, kaj pli malpli samaĝa kastelo, de kiu oni vidas belan panoramon de la urbo. Dum la someroj la korto de la kastelo ofte funkcias kiel scenejo.

Proksime de Kavala estas la ruina urbo Filipio, kie Sankta Paŭlo estis enkarcerigita. Troviĝas ĉi tie restaĵoj heleinaj, romiaj kaj kristanaj. En Limenas, la urbeto sur la insulo plej proksima de Kavala, troviĝas urba muro de ĉ. la 6-a jarcento a.K. Proksime de la urbeto situas marmorfosejo.

La fondinto de la lasta egipta dinastio Mohamet Ali loĝis antaŭ 250 jaroj kun siaj sep edzinoj en domo, kiu nun estas muzeo, en Kavala. En la muro ĉe la pordego oni povas admiri turneban cilindron per kiu la edzinoj de Mohamet Ali povis servis al la viroj sen esti vidataj. Alia pli moderna vidindaĵo en la urbo estas la tabaka muzeo. Tabako donis al la urbo famon.

Meze de la centra placo de Kavala oni trovas la Nacian Bankon. En unu flanko de la muro estas monaŭtomato per kiu oni povas ŝanĝi valutojn. Stelojn ĝi ne akceptas, sed ĝi skribas en Esperanto.



## Retumantaj ornitologoj

Antaŭ nelonge ni legis en la ĵurnaloj ke retumantoj, kiuj serĉis mamojn anstataŭe trovis paruojn, pro la dusenceco de la angla vorto *tit*. Ĝi signifas kaj mamon kaj paruon. Oni kompatis la mamretumantojn sen averti la paruretumantojn pri la kontraŭa risko.

La norvegaj paruretumantoj, kiuj insistas uzus sian propran lingvon senevite trovas en Interreto ne nur paruojn, sed ankaŭ diversajn malgrandajn vegetaĵojn k.t.p. Ankaŭ la norvega vorto *tite* estas dusenca.

En Hungario la paruretumantoj senhezite tajpu la hungaran vorton de paruo, *ĉinege*, ĉar tiel ili senaverte povus alfronti ne la brustegojn, sed kontraŭe la maldikulinajn farantaj kontraŭgrasan propagandon. *Ĉinege* estas ankaŭ la vorto por maldika.

Oni same bone povas imagi ke la du-

senceco de la sveda vorto *mes* en la kadro de svedaj interretaj adresoj erarigas kelkajn paruretumantojn al la hejmapaĝoj de hejmemaj poltronoj.

En Hispanio kaj Latin-Ameriko tiuj retumantoj, kiuj per la vorto *paro* serĉas paruojn sin trovas en la ribelma tekstoamaso de strikantaj laboristoj. La hispana vorto *paro* ankaŭ signifas strikon. La parolantoj de latino, kiuj serĉas *Parus* ne nur trovas paruojn, sed ankaŭ turistan propagandon por la meza insulo de la Ciklada insularo, Paroso.

Mi demandas min: Ĉu esperanto estas enkondukenda por ke la paruretumantoj ne plu suferu?

Red

## Denove pri vojaĝo al Adelajdo

Vi certe ŝatus viziti la kontinenton Aŭstralio, sed la ekonomia flanko de tia aventuro starigas altan baron. Kelkaj svedaj esperantistoj tamen aliĝis kaj planis por la vojaĝo. Lastaj informoj diras ke 15 personoj intencas vojaĝi. En la antaŭa numero de *La Espero* ni informis pri du vojaĝagentejoj, al kiuj vi mem povas direkti viajn demandojn. Pro la komprenebla fakto, ke SEF ne intencis prepari grupvojaĝon, ni almenaŭ donis kelkajn informojn. UEA aranĝas grupvojaĝon el Amsterdamo.

Se vi turnos vin al Wagon-Lit en Uppsala, uzu prefere la numeron 018 – 69 29 00. La numeron indikitan en la antaŭa numero de *La Espero* uzas entreprenoj, kiuj rezervas biletojn.

Red

### APRIL

- 1-25 Dek tria Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo, vojaĝo tra deko da landoj.
- 3-30 Esperanto-Ekspozicio pri Komenio kaj Zamenhof, Ĉeĥa Kultura Centro, Varsovio, Pollando.
- 4-6 Fromaĝa semajnfino de Junulara Esperantista Franca Organizo, Grenoblo, Francio.
- 4-6 Junulara Esperanto-Renkonto, Piliscsév, Hungario.
- 4-6 Kursa semajnfino, bieno Njegus, Kroatio.
- 6-13 Krozado sur Rejno kaj Mozelo, de Kolonjo al Bernkastel, Germanio.
- 8-12 Sed fine (kaj diable!) kio estas vortaro?, Bouresse, Francio.
- 11-13 Pri io aŭ nenio, amuza kunestado, Proprad, Slovakio.
- 11-13 Kvara ELTEKO, internacia laborgrupo pri elektroniko, telematiko, komputiko, Rumberk/Hamel, Germanio.
- 12-13 Dek sepa Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, Barreiro, Portugalio.
- 12-19 Internacia Renkonto de Infanoj, Grésillon, Francio.
- 15-19 La vortkunmetado?..., Bouresse, Francio.
- 19 Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo, Nederlando.
- 19-20 Perfekta seminario por komencintoj, progresintoj, ekspertoj, Hamburgo, Germanio.
- 19-20 Sepa Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio, Benidorm, Hispanio.
- 22-26 Dua Internacia studenta Scienca kaj Teknika Kongreso de Azia Pacifikaj Landoj, Vladivostoko, Rusio.
- 24-27 A-seminario por Cseh-instruistoj, Triesto, Italio.
- 26-27 Sepa Internacia Kurskunveno, ĉe Kita Kjuŝu apud Hukuoka, Japanio.
- 26-27 Sándor Szathmári (1897-1974): Lia vivo kaj verkaro, La Chaux-de-Fonds, Svislando.
- 26-4/5 Dudek duaj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kaj Pola studsesio de AIS San-Marino, Bydgoszcz, Pollando.
- 27 Cseh-tago, Rijeka, Kroatio.
- 27 Trilanda Renkontiĝo, Aachen, Germanio.
- 27-4/5 TEJO-seminario pri informado, Budapeŝto, Hungario.

*Unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas.*

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPNSITTET MANUSKRIFT KURSIV, TECKNAT AV FRANKO LUIN 1992]

OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.  
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto och andra språk.

OMNIBUS · BOX 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93 · FRANKO@OMNIBUS.SE

Malmö Esperantoförening  
Kronetorpsg 94  
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm


## KRUCVORTA ENIGMO

### Horizontale

- 1 Ili ne forestas
- 2 Nuntempe – Matematika simbolo
- 3 Perdo de konscio –  
Labor' kun pasto
- 4 Venis malfrue – Grupo
- 5 En budo – Prenas ofte  
rabkaptantoj pli ol nun
- 6 Trudherb' aŭ furaĝplant' –  
Atlantikan
- 7 Azian ŝtaton
- 8 Fiŝkaptilo – Part' de io
- 9 Speco de agato – Fara
- 10 Birdloĝejon – Malolda (rad.)

### Vertikale

- A Serĉas svatiganto
- B Rilate al loĝanto en  
Sudamerika lando
- C Anestezil' – Ne kunportis
- Ĉ Markolo – Malluma temp'
- D Ĉina religia doktrino – Aŭdeblaĵ'
- E Prepozicio – Moveblan vendejon
- F Ankaŭ ne – Grup'
- G Estas ofte la banantaj ankaŭ
- Ĝ Muzikan teatraĵon – Estu aktiva
- H Lingvon – Mov' por svingi sin  
antaŭen



## SOLVO DE 96/3-6

|    | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1  | E | T | E | S | T | A | J | O | J | N |
| 2  | P | A | N | E | R |   | A | V | I | O |
| 3  | I | R | I | S | O |   | N | O | D | O |
| 4  | S | A | R | O | N | G | O |   |   |   |
| 5  | K | N | A | P | O | N | S |   | R |   |
| 6  | O | T |   | A | N | O | R | A | K | O |
| 7  | P | E | O | N |   | M | E | T | A | S |
| 8  | E | L | D | I | R | O | S | R | I | T |
| 9  | J | A | R | A |   | T | A | N | I |   |
| 10 | O | N | O | M | A | T | O | P | E | O |

# Aktuala prezaro

de propraj eldonaĵoj

### Legaĵoj

|   |     |
|---|-----|
| Aniara                                  | 90  |
| Bona rido                               | 30  |
| El la vivo de Zamenhof                  | 30  |
| Inter sudo kaj nordo                    | 60  |
| Islandaj pravoĉoj, <i>bindita</i>       | 60  |
| Islandaj pravoĉoj, <i>broŝurita</i>     | 45  |
| Jaroj sur tero                          | 60  |
| Kredo Floroj Dinamito                   | 45  |
| Mi serĉis oron kaj oleon                | 45  |
| Orm la Ruĝa                             | 150 |
| Printempo de morto                      | 60  |
| Ŝipestro rakontas                       | 45  |
| Tra lando de indianoj, <i>bindita</i>   | 60  |
| Tra lando de indianoj, <i>broŝurita</i> | 45  |
| Vivu la stel'                           | 30  |

### Lerniloj

|                              |     |
|------------------------------|-----|
| Allas andra språk            | 75  |
| Ek!                          | 75  |
| Jen nia mondo 1              | 90  |
| Jen nia mondo 2              | 90  |
| Kompendium                   | 120 |
| Raka vägen till språkkunskap | 45  |
| Språket över gränserna       | 45  |
| Svensk esperantogrammatik    | 75  |

### Vortaroj

|                                  |     |
|----------------------------------|-----|
| Esperanto-svensk ordbok          | 90  |
| Etimologia vortaro 1             | 150 |
| Etimologia vortaro 2             | 150 |
| Etimologia vortaro 3             | 150 |
| Etimologia vortaro 4             | 150 |
| – Etimologia vortaro 1+2+3+4     | 500 |
| Lilla ordboken                   | 90  |
| Ordbok Svenska-Esperanto         | 450 |
| – komputora versio por Macintosh | 600 |

### Kasedoj

|   |     |
|---|-----|
| Folioj de mia memoro ( <i>Ĵomart kaj Nataŝa</i> )                         | 90  |
| Denaska kongresano – 2 sonbendoj<br>( <i>rakontoj de Sten Johansson</i> ) | 120 |

Ĉiuj prezoj estas en svedaj kronoj (SEK).

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Vikingagatan 24 · 113 42 Stockholm · Svedio